



ESPERANTO NORMANDA BULTENO

unuigo de normandaj esperantistoj

Redaktas: Pierre QUILLAUD 16, rue Lt Vaisseau Paris
76120 LE GRAND-QUEVILLY Tel. 35 69 66 09
Abon-Kotizoj: 45 Frankoj. Union des Espérantistes de Normandie
CCP 283 - 40 H ROUEN

BONDEZIROJ 1997

Le Président et les membres du Bureau présentent aux lecteurs de ce bulletin leurs meilleurs voeux pour l'année 1997.

En dehors des souhaits personnels pour vous et vos familles, nous souhaitons bien sûr que la nouvelle année soit favorable pour l'idée qui nous unit tous: la divulgation et l'utilisation de la véritable langue internationale.

Nous ignorons ce que deviendra politiquement l'Europe mais de toutes façons, les relations internationales, commerciales et touristiques s'amplifieront; ces relations auront nécessairement besoin d'un langage commun. Le langage commun de l'Europe sera-t-il la langue américaine parce que les USA sont actuellement la puissance économiquement dominante? Le choix d'une langue commune (et non pas unique) pour l'Europe nous sera-t-il imposé par les firmes Coca-Cola, Mac-Donald et autres?... La solution existe mais elle est méconnue du grand public. La plupart des gens, - surtout les jeunes -, ne connaissent pas le mot "Espéranto". D'autres pensent que c'est une vieillerie qui a disparu (110 ans, c'est pourtant peu pour la plus jeune des langues vivantes). L'Espéranto est difficile à maîtriser, malgré une publicité insistant trop sur sa facilité. Mais l'Espéranto est beaucoup plus facile à apprendre que toute autre langue. A cause de cette relative facilité, à cause de sa neutralité (indépendance à l'égard des nationalismes, des impérialismes et des idéologies), c'est la solution qui s'impose. Depuis 1887, le projet de langue internationale du Docteur Zamenhof est devenu une véritable langue vivante; cette période probatoire était nécessaire pour son perfectionnement: oeuvres littéraires, revues, congrès, séminaires ont contribué à son enrichissement. Les autres projets de langue internationale se sont évanouis après être restés à l'état confidentiel.

Mais nous devons vaincre les préjugés, les a-priori, les obstacles de toutes sortes dressés par tous ceux que l'Espéranto gênerait. Pour continuer ce combat, nous avons besoin du militantisme de chacun. Ce

militantisme a besoin d'être encadré par des organisations dynamiques et puissantes. Nous avons toujours engagé nos adhérents et lecteurs à choisir l'association internationale et nationale qui convient le mieux à leurs idées. C'est pourquoi vous trouverez dans ce bulletin les conditions d'adhésion aux associations et les modalités d'abonnements à différents périodiques pour l'année 1997.

P.QUILLAUD



Kunveno de la Administra Konsilio de UNE
kaj de la Normanda Federacio (UFE)
 en Yvetot, la 12-an de Oktobro 96

+++++

La Administra konsilio kunvenis en Yvetot, la 12-an de oktobro 1996.

Ĉeestis: S-roj Pottier, Gibaux kaj Quillaud, konsilianoj, kaj S-ro Touileb el Fécamp.

Ekspozicio en Fécamp: S-ro Touileb klarigas la strukturon de la RIK-metodo kiun li uzas por instrui Esperanton kaj sian projekton de publika ekspozicio pri Esperanto en Fécamp la 26-an kaj 27-an de Oktobro en la kadro de la tago de Radio-amatoroj (diversaj dokumentoj: revuoj, libroj, prospektoj turismaj aŭ komercaj, ktp..., plus televida kasedo pri Esperanto).

Elektio de la novaj estraranoj : Prezidanto: Pierre POTTIER

Vicprezidanto: Jean GIBAU

Sekretario: Pierre POTTIER

Kasisto : Pierre QUILLAUD

Stato kaj rilatoj de la 2 normandaj asocioj: (U.N.E. kaj Normanda Federacio de U.F.E.): La rilatoj estas bonaj. Cetere la du asocioj havas la saman estraron. Do, neniuj problemoj de komunikado,...sed nesufiĉe da aktiveco.

Prelegoj de ge-S-roj Robineau: La temo estas tre interesa sed estus tre malfacile organizi rondiron de la prelegantoj tra Normandio: ni bezonus senpagajn prelegsalonojn disponeblajn preskaŭ samdate en diversaj urboj.

Normanda Bulteno: Ĝi estas nuntempe tute kontentiga. 118 ekzempleroj de ĉiu numero estas sendataj. Dankon al familio Lemarchand kiu prizorgas la sendadon.

Kotizoj 1997: 45 F por tiuj kiuj sendas ĝin rekte al UNE, kaj nur 30 F por tiuj kiuj sendas ĝin pere de grupo (por parte kompensi ilian grupkotizon)

Financoj: En kaso nun: U.N.E.: 11631 F, Federacio: 2978 F

Ni klopodos obtieni ŝparkaslibreton.

Venonta Ĝenerala Kunveno: P.Quillaud faros alvokon en la venonta bulteno por trovi lokon kaj daton por organizi tiun kunvenon.

La Prezidanto: Pierre POTTIER

ESPERANTO KAJ LA ANTIKVA GREKA

Jam de tri jaroj mi sekvas la kursojn de greka en la Universitato porTria aĝo de Caen. Estas por mi okazo konkrete tuŝi la fakton ke Zamenhof ankaŭ inspiriĝis de tiu malnova lingvo. Jen kelkaj frazoj en malnova greka, transskribitaj laŭ nia esperanta alfabeto. Prononcu ilin kiel se temus pri esperantaĵo, eĉ aspiracianta la "h" se ili komencas vorton; (post "t" kaj "p" mi metis tiun neprononcendan literon nur por ne tro ŝanĝi la aspekton je kiu la Francoj alkitimiĝis, de grekdevenantaj vortoj); mi notis la tonikan akcenton per dikaj literoj. En la sekvantaj ekzemploj, la nombro de vortoj kaj ilia ordo, estas ekzakte la sama en ambaŭ tekstoj, greka kaj esperanta.

- Ho mikros georgos **blepej** ton kalon **hippon** en to agro :
La eta terkulturisto rigardas la belan ĉevalon en la kampo
- Ho kalos **hippos blepej** ton mikron **georgon**:
La bela ĉevalo rigardas la etan terkulturiston.

Oni rimarkas ke en tiuj ekzemploj, la marko de akuzativo estas "n".

- Hoj mikro**j** georgo**j** **blepusi** tus kalus **hippus**: la etaj terkulturistoj rigardas la belajn ĉevalojn.
- Hoj **hippoj blepusi** tus georgus: la ĉevaloj rigardas la terkulturistojn.

Oni rimarkas ke en tiuj kazoj, la pluralo formiĝas aldonante "j" al la subjekto, kiel en esperanto.

- Ho despotes kaj ho georgos ejsi **philoj**: la mastro kaj la kamparano estas amikoj.

Oni konstatas ke post iom da pripenso, la plejmulto de la vortaro ne estas tute fremda. (georgos = en la franca Georges, géorgique, gé=tero, kaj erg, org, urg = labori; cf. **ergonomie**, **organe**, **sidérurgie**. Kaj = kaj)

Sed ne estas ĉio.

En la greka, oni tre ofte formas komponitajn vortojn kiel en esperanto,...sed tamen malpli libere ĉar oni estas limigita de la uzo. Jen kelkaj ekzemploj:

ornithotrophejon:	birdonutrejo	basse-cour
siderurgejon	ferlaborejo	atelier de forgeron
tektonejon	lignaĵistejo	atelier de menuiserie
bibliopolejon	librovendejo	librairie (nota: mono-pole=un seul vendeur)

Tiuj ekzemploj ankaŭ montras ke la esperanta sufikso "-ej" venas de la greka,... kiu bedaŭrinde ne sisteme uzas ĝin por si mem.

Kiel esperanto, la malnova greka lingvo multe uzas afiksojn, sed malpli sisteme kaj libere ol esperanto. Jen ekzemploj:

- apteros	= senflugila	- amethodos	= senmetoda
- aphobos	= sentima	-aphobia	= sentimeco
- aphonos	= senvoĉa	-aphonia	= senvoĉeco
- philergos	= laborama laborema	- philergia	= laboremo
- philogŭnes (philogynes)	= virinema	- philogŭnia	= virinemo
- philargŭros (philargyros)	= monema	- philargŭria	= monemo

NB: la litero "y" prononciĝis "ü" kiel en la franca "mur"; ĉar tiu sono ne ekzistis en la latina, la romanoj ĝin nomis "greka i"; ilia sono "i" estante la plej proksima je tiu ü; ili enkondukis la "y" en sia lingvo por transskribi la vortojn enhavantajn tiun sonon, kiujn ili prenis de la greka (ekz. "papyrus" = papero).

H.ROUSSEAU, Caen

@@

LA KASISTO:


COTISATIONS 1996: Nous avons reçu pour l'année en cours les abonnements-cotisations de : Gesinjoroj Angenault, Bataille, Benoit, Berlot, Bessière, Bettancourt L et M, Boucher, Bonvotier, Canu, Caron, Chevallier, Colombel, Couture, Defrance, Deuff, Domingo, Duhois, Duflo, Duhamel, Evrard, Feret A et S, Gibaux, Giordano, Guérout, Guerre, Guilmot, Guionie, Haulard, Helbert, Huet, Jean, Jourdain D et ML, Jouvin, Langanay, Lebrun, Lefebvre M., Lehericey, Lecouvreur, Legros, Lemarchand, Leroy, Lévy, Loisel, Longuet, Magerel, Mary, Masseron, Maurouard, Mendes, Michaud R. et G., Millet, Moyon, Noel, Nicolas, Ordonaud, Peltier, Pilet, Pottier, Poupinet, Quillaud, Quillet, Rauch, Robiolle, Roblin, Rolland, Rousseau, Séry J et S, Tailpied, Tanguy, Teani, Touilleb, Varneville, Vauquelin, Zilliox

Votre nom ne figure pas dans cette liste ?

- Parce que vous êtes un nouvel espérantiste ou un ami de l'espéranto et que nous vous l'adressons gratuitement... pendant un certain temps.
- Parce que vous avez oublié de régler votre cotisation 1996; dans ce cas n'attendez plus; nous attendons votre chèque.

Dans le bulletin précédent, nous avons adressé une lettre de rappel aux retardataires. Beaucoup d'entre eux nous ont répondu amicalement et ont régularisé leur situation. Nous les en remercions.

Nous avons aussi reçu quelques cotisations pour 1997.



KOTIZOJ POR ESPERANTISTAJ ASOCIOJ

UNION DES ESPERANTISTES DE NORMANDIE

45 FRF

Pagu al UEN CCP Rouen 283 40 H aŭ sendu ĉekon al

P.Quillaud, 16 rue Lt Vaisseau Paris 76120 Grand Quevilly

UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO:

nur kun jarlibro

120 FRF

Jarlibro+revuo "Esperanto"

310 FRF

Pagu al Esperanto-France (UFE) 4 bis rue de la Cerisaie 75004 Paris

ESPERANTO-FRANCE (UFE)

Franca Esperantisto +Esperanto Actualités

300 FRF

nur Esperanto-Actualités

160 FRF

Pagu al Esperanto France(UFE) 4 bis rue de la Cerisaie 75004 Paris

TEJO (junuloj) kun revuoj "Kontakto"+"Tejo Tutmonde"

120 FRF

Pagu al Esperanto France (UFE)

JEFO kun revuoj "Jefo informas"+Koncize"

170 FRF

(por studentoj kaj senlaboruloj)

100 FRF

JEFO + UFE

300 FRF

Pagu al Esperanto France (UFE)

FRANCA KATOLIKA ESPERANTO ASOCIO (kun bulteno)

40 FRF

Pagu al Association Française catholique pour l'Espéranto

CCP Rouen 2324 93 N aŭ sendu ĉekon al S-ro Villeneuve

14 rue du Clair de Lune 91530 Saint Chéron

FEDERATION ESPERANTISTE DU TRAVAIL

Normala kotizo, sen revuo

50 FRF

Kun "Le travailleur espérantiste"

140 FRF

Pagu al Fédération Espérantiste du Travail, 115 rue Béranger

92320 Chatillon, CCP Paris 902 52 F

SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

Jarlibro+"Sennaciulo"+"Sennacieca Revuo"

290 FRF

por emeritoj kiuj havas malaltan pensionon

220 FRF

por junuloj kaj senlaboruloj

145 FRF

Pagu al P.Quillaud, 16 rue Lt Vaisseau Paris, 76120 Grand Quevilly

CCP Rouen 1906 23 C

SAT-AMIKARO

kun bulteno

180 FRF

por junuloj (- 25 jaraj)

90 FRF

Pagu al André Sadier, 22 Av. P.V.Sadier Bât. ND

93000 Bobigny, CCP Paris 7658 05 C

ALIAJ ASOCIOJ Bonvolu informi nin ĉar ni mem ignoras la kondiĉojn.

ABONU REVUOJN

Brita Esperantisto	6 numeroj	120 FRF
Dia Regno	12 numeroj	65 FRF
El Popola Ĉinio	12 numeroj	150 FRF
Esperanto (por ne-membroj de UEA)	11 numeroj	200 FRF
Eventoj (el Budapeŝto)	24 numeroj	230 FRF
Fonto(literatura revuo)	12 numeroj	140 FRF
Franca Esperantisto (por ne-membroj)	11 numeroj	200 FRF
Heroldo de Esperanto	16 numeroj	180 FRF
Juna Amiko (interlerneja revuo)	4 numeroj	55 FRF
Kontakto (por ne-Tejo membroj)	6 numeroj	125 FRF
Kulturaj Kajeroj (Grésillon)	4 numeroj	80 FRF
La Domo (revuo de profesioj kaj servoj)	4 numeroj	125 FRF
La Kancerkliniko (politika, kultura...)	5 numeroj	125 FRF
La Lanterno Azia	11 numeroj	140 FRF
La ondo de Esperanto (el Rusio)	6 numeroj	75 FRF
Literatura Foiro	6 numeroj	170 FRF
Litova Stelo	6 numeroj	65 FRF
Monato (internacia magazino)	12 numeroj	235 FRF
Rok'Gazet' (pri muziko)	4 numeroj	100 FRF
Ruslanda Esperantisto	12 numeroj	75 FRF

Abonoj validas por la kalendaro jaro krom por El Popola Ĉinio kies abono povas komenciĝi en iu ajn monato.

Por ĉi-supraj revuoj, pagu abonojn pere de Esperanto-France 4 bis rue de la Cerisaie 75004 Paris.

ALIAJ REVUOJ

<u>Le Travailleur Espérantiste</u>	normal	100 FRF
	soutien	170 FRF
<u>Verda Kolombo</u>		60 FRF
<u>Internaciisto</u>		80 FRF

Pagu abonon al Fédération Espérantiste du Travail 115 rue Béranger
92320 Châtillon, CCP 902 52 F Paris

<u>SAT Amikaro</u> (por ne-membroj de la asocio)	160 FRF
Pagu abonon al André Sadier, 22 Av. P.V. Couturier, Bât. ND 93000 Bobigny, CCP 7658 05 C Paris	

<u>Sennaciulo</u> (por ne-membroj de la asocio)	11 numeroj	
kaj <u>Sennacieca Revuo</u>	1 numero	ambaŭ 320 FRF
Pagu abonon al Pierre Quillaud, 16 rue Lt Vaisseau Paris 76120 Grand Quevilly, CCP Rouen 1906 23 C		

<u>La Migranto</u>	25 rue de Bourgogne - 94440 VILLECRESNES	50 FRF
Pagu al Aurore Casanova	118 Av. La Ferrière 94000 Créteil	

IMPRESOJ PRI EKSPOZICIO DE RADIO-AMATOROJ EN FECAMP



7

"Vi revas pri malproksimaj landoj; vi ŝatus korespondi kun tutmondaj personoj; via revo povas efektiviĝi. Venu rekuniĝi kun ni!"

Jen la titolo de kolora faldfolio destinita por konigi la radio-amatorecon. Kaj interne, oni povas legi: *"kion ĝi povas alporti al ĝejnuloj? Sciavideco pri la mondo; ĉiu radio-amatoro, virino aŭ viro, kiaj ajn estu sia lando, sia koloro, sia religio; telekomunikado riĉigas homajn rilatojn tra asociaj renkontoj."*

Ĉu ni ne rekonas ĉi-tie Internan Ideon de Esperanto?

Do, Esperanto ĉeestis duafoje la 4-an Ekspozicion de Radio-Amatoroj, Radio-Diletantoj kaj Komunikado kiu okazis la 26-an kaj 27-an de oktobro 1996 en teatro Maurice Sadorge en Fécamp.

Dum inaŭguro, ĉeestis urbaj elektitoj, Sinjorino Bredin, eŭropa deputitino kaj la loka gazetaro. Nia budo estis rimarkita kaj bone akceptita: 86 diversaĝaj ĝevizitantoj atentis nian budon kaj kunprenis dokumentaron (en 1994, ni akceptis nur 58 vizitantojn). Ĉeesto de ĝesperantistoj de Havra kaj Rŭena regionoj estis ankaŭ kuraĝiga; fakte 21 venis! Ĉiu alportis sian kontribuon: afiŝoj, gardostaro de budo, dokumentaĵoj, verkaĵoj, konsiloj, subteno kaj kuraĝigoj.

Unue, timigata, vizitanto alproksimiĝas al budo; li estas retenema sed sufiĉe scivolema por halti/

"ĉu vi Esperanton konas?"

"neniel!"

Kaj la diskuto komenciĝas per tre mallonga prezentado de la lingvo, ĝiaj avantaĝoj kompare al la angla, nombro da tutmondaj lingvoj, facileco de Esperanto-lernado, ktp... Kutima argumento pri la nesufiĉa nombro da esperantistoj estas objeta. Responde, ni uzas multajn ekzemplojn.

Ĉiuj ĝejnuloj ignoras ekziston de Esperanto. Ili estas persvaditaj ke la angla estas la internacia lingvo. Sed ili estas sufiĉe surprizataj pro la argumento ke fremda lingvo estas malofte flue parolata kaj plej ofte proksimume. Responde, oni devas ilin provizi de argumentoj kaj lasi ilin pripensi....

Du virinoj volis aŭdi kiel Esperanto "tintas"! *"tio similas la hispanan!"* Aliulino demandis pri literaturo. Ŝi interesiĝis pro komentoj de Umberto Eco. La radio-diletantoj kaj radio-amatoroj konstatas fakte ke ili ne povas daŭrigi longtempe la interŝanĝojn per nur iom da angla kaj iom da hispana....

Multo ankoraŭ farendas ĉe grandpubliko por informi kaj respondi al ĉiuj demandoj pri lernado de lingvoj kaj aliaj aspektoj de komunikado.

Claude Piron ĉeestis....pere de videokasedo ! La titolo de lia prelego estas: *"Ĉu ekzistas alternativo al la angla por tutmonde interkompreniĝi? kaj ĉu Esperanto estas pli viva ol oni ĝenerale kredas?"*. Liaj verkaĵoj: La defio de lingvoj, Konfeso de Eŭropa Frenezulo alportis subtenadon de aŭtoritatulo pri la psiko-

lingvistikaj demandoj. Koncerne la Fécamp-anoj, ni rimarkigis al ili la disponeblecon de cititaj verkaĵoj en la urba biblioteko.

Kelkaj interesiĝintaj personoj el Havro reforiris kun adreso por eventuala unua kontakto. Ni donis nian telefonnumeron al Fekampanoj.

Nia budo enhavis dekon da verdaj kaj blankaj tabuloj, multkolorajn afiŝojn, etiketojn por vortfarada demonstrado, belan verdan afiŝon por anonci la senĉesan elsendon de prelego de Claude Piron videokasede, franclingvajn broŝurojn, informajn slipojn, internaciajn revuojn, informilojn pri la diversa uzado de la lingvo. Nia budo estis ankaŭ tre aŭskultita!: Muziko kun Kajto-grupo, kantoj de Olivier Tsaŭt kaj de Nikolin', tekstoj kaj konversacio el ASSIMIL-metodo.

Ni estis intervjuitaj dum kelkaj minutoj pro eksperimento de tuja televido-elsendo. Ni do havis okazon informi pri la avantaĝoj de la internacia lingvo.

Ni proponis al kelkaj radio-diletantoj, el kiuj Sro Stéphane Groult ĉeforganizanto, aliajn kaj pliajn informojn. El tio, rezultos eble, plidaŭrigo de efikoj de tiu ekspozicio.

Dum tiu evento, ni havis okazon konatiĝi kaj renkontiĝi kun malnovaj esperantistoj kiuj emocie rakontis siajn rememoraĵojn.

La bilanco de tiu manifestacio estas tre kuraĝiga. Ni estas denove jam invitataj venontan jaron, la 25-an kaj 26-an de oktobro 1997!

Mouloud kaj Taous TOUILEB

Unu el la celoj de Unuiĝo de Normandaj Esperantistoj estas : helpo al kreado kaj subtenado al novaj grupoj. Tial, ni finance kontribuis al tiu propaganda manifestacio

@@

ĜENERALA KUNVENO DE UNE:

Laŭ la statutoj de nia unuiĝo, oni devas organizi ĉiujare ĝeneralan kunvenon. La 2 lastaj okazis en Rouen. Kiu organizos la venontan? Kaj kie? Bonvolu kontakti la Prezidanton Pierre Pottier

@@
LANDAJ KONGRESOJ

La Kongreso de ESPERANTO-FRANCE okazos de la 16-a ĝis la 19-a de Majo en.....Stuttgart!. Informojn vi trovos en venonta bulteno.

La Kongreso de SAT-AMIKARO okazos de la 29-a ĝis la 31-a de Marto (Pasko) en Limoges. Petu informilon kaj aliĝilon de: Isabelle JACOB, 1 route de Florensac FR 87200 Saint-Brice-sur-Vienne

BONAN JARON BONAN SANON !